

TEA-BULTENO

25ª JARO - N° 163 MAJO-JUNIO-JULIO N. 5-6-7/2022

Zorge ni sekvu la instruojn de la historio: forgesinte la doloron de milito, tro multaj forgesas la bezonon pri paco, kiu nestas en ĉiu proksimulo, en ĉiu frato. Kaj tiel oni lasas sin venki de la mondo.

Titus Brandsma, sacerdoto, ĵurnalisto, verkisto, profesoro, esperantisto (1881-1942)

Kara Legantaro!

Ĉi-foje mi devas komenci la kutiman enkondukon per pardonpeto: ja junio estas finiĝonta kaj eble vi legos ĉi vortojn nur en julio! Teruran malfruiĝon havas ĉi periodaĵo. Mi ne ĝenos vin per miaj dubindaj pretekstoj, sed mi esperas, ke pro la bonega kaj interesega enhavo (ndr: *iom malmodeste dirite)* vi emos forgesi mian pekon.

Granda evento okazis en la katolika Esperanto-mondo: t.e. la sanktuliĝo de la beata Titus Brandsma, ĉiela patrono de IKUE, kiu, per ceremonio en Placo S-ta Petro, Romo, estis solene kanonizita de papo Francisko je la 5ª Paska dimanĉo, nome la 15an de majo 2022.

Ne gravas, ĉu oni estas religiema aŭ ateisma, katolika aŭ protestanta, ĉar tio dirita simbolas la rekonon de la elstara agado de vere eksterordinara persono: karmelana kaj ekumenisma sacerdoto, universitata profesoro, verkisto, ĵurnalisto kaj ... Esperantisto!

Li dediĉis sian tutan vivon al aliaj, pasie kaj kuraĝe li obstinis al la vero, al defendo de iu ajn kredo kaj de la esprimlibereco. Kiel ĵurnalisto li asertis: "la presaĵoj estas la plej taŭga podio de kie prediki la veron... Ni uzu ilin, ĉar tiuj estas la forto de la paroloj kontraŭ la perforto de la armiloj, ili estas la forto de nia luktado por atingo de la vero."

Via redaktanto Elda

La 15an de majo 2022
Papo Francisko proklamis Sankta la esperantiston *Titus Brandsma*

- Prenu ĉi tiun rozarion, bonvole ĝin uzu por preĝi.

- Mi ne bezonas ĝin. Mi ne kapablas preĝi.

- Provu almenaŭ diri: Saluton Maria, preĝu por ni, pekuloj...

Dimanĉon la 26an de julio 1942, en la koncentrejo de Dachau: Juna nederlanda flegistino, serve de la naziaj torturistoj, estas murdonta per injektado de karbola acido *(*aŭ *fenolo)* la samnacianon Titus Brandsma. Tiuj supre diritaj vortoj tute ne efikas sur ŝin, tiumomente, kaj ŝi finfaras sian *devon* laŭordone. Kelkajn tagojn antaŭ sia morto li estis transdoninta ĝuste tiun rozarion al kuracisto, dirante: "Baldaŭ mi ne plu bezonos ĝin".

Sed tiu fakto restas gravurita en la memoro kaj koro de tiu flegistino. Postmilite ŝi vivas sub malvera nomo, persekutata de la polico el duona Eŭropo pro siaj brutalaĵoj kaj mortigoj de miloj da malliberuloj. En 1955 ŝi prezentas sin spontanee, sed sekrete, kiel atestanto dum la proceso de beatigado de T. Brandsma: je la 3ª de novembro 1985 Johano Paŭlo la 2ª lin proklamas "Beata" kaj "Martiro". La Papo tiel ĉi lin difinas: "la martiro de sinesprimlibereco", pro lia firma luktado, kiel ĵurnalisto, kontraŭ la tiraneco de la diktaturo kaj streĉa defendado de la katolika gazetaro, pro maltima verkado de artikoloj prezentantaj la puran, senvualan veron, pro lia kuraĝo oponi solidan rezistofronton al naziismo.

La 25an de novembro 2021 Papo Francisko rajtigas la Kongregacion de sanktuloj promulgi dekreton rilate al miraklo atribuita al Titus Brandsma. Ĝi ligiĝas al pastro Michel Driscoll, usonano, kiu, en 2004, suferis pro maligna melanomo 4-stadia: li propetis pastron Titus je resaniĝo kaj lia alvoko estis elaŭdita.

Vivo

La 23an de februaro 1881, en la granda bieno de Ugokioster, en Frisio, Nederlando, naskiĝas, kvina el ses gefiloj, Anno Sjoerd Brandsma en familio de katolikaj kamparanoj. El lia frataro kvin iĝas monaĥoj. Inteligenta, facile lernanta, studema kaj religiema, dekunujara li eniras franciskanan studentpensionon. Dekokaĝa li daŭrigas sian studadon ĉe karmelana monaĥejo: pro amo kaj respekto al la patro li alprenas lian personan nomon, Titus. Inter preĝado kaj lernado, li eksentas grandan em-

→

on ankaŭ al verkado, kio - li intuicias - estos parto de lia estonta agado: li fakte iĝos la Plum-apostolo!

Post bonegaj rezultoj en sia studado de filozofio kaj teologio, junie 1905 li estas ordinita sacerdoto. En 1909, ĉe la Pontifika Universitato Gregoria, Romo, li doktoriĝas pri filozofio. Reveninte al sia patrujo, li dediĉiĝas intense al siaj laboroj kiel sacerdoto, instruisto kaj ĵurnalisto.

En ĵurnalisma kampo li pasie ekaktivadas: kunlaboras kun pli ol tridek tagĵurnaloj kaj periodaĵoj kaj baldaŭ iĝas direktoro de loka ĵurnalo. En 1909 li fondas gazeton kiu atingas eldonadon de 13 000 ekzempleroj tage: *Karmelrozen* (Rozoj de Karmel). Li fariĝas la spirita patro por multaj el siaj kolegoj. En 1923 Titus Brandsma eniras en la ĵus fonditan katolikan Universitaton de Nimego kiel docento pri filozofio kaj historio de mistikismo: post nur unu jaro li fariĝas ties rektoro.



Ĵurnaloj kaj katedro estas por li la podioj, de kie lanĉi siajn atakojn al la hitlera ideologio. Tion ĉi aŭdace li skribas: "Kiu volas venki la mondon por Kristo, devas kuraĝi kontraŭbatali la naziismon", kiun li difinas *pagana* kaj *nigra pesto*.

Je la 1ª de majo 1940 Nederlando estas invadita de la germanaj tankoj. La nomo de Titus Brandsma aperas en la nigra listo de Gestapo kiel malamiko de nacisocialismo.

La katolika mondo, lernejoj kaj instruado, gazetaro kaj ĵurnalistoj estas en la celilo de la okupantoj: ilia firma intenco estas transformi ĉion ĉi en obeeman instrumenton por doktrinigi kaj domini la popolon. Ekas la diskriminacioj kaj timigaj minacoj kontraŭ la religia personaro de la lernejoj. Patro Titus, nomita de la ĉefepiskopo Johannes de Jong asistanto de la katolikaj ĵurnalistoj, tute ne estas malkuraĝigita de sia danĝera pozicio, male li ekorganizas firman rezistan fronton al naziismo. La episkopoj taskigas lin protesti ĉe la centra naziista komandejo pro tiu brutala entrudiĝemo. Sekve de tio lia pozicio fariĝas pli kaj pli riska. Konscia pri la danĝero de sia misio, li decideme antaŭenpaŝas: malgraŭ la cenzuro ordonita de la naziisma aparataro al la katolika gazetaro, li kontaktiĝas kun 14 ĵurnaldirektoroj, kiujn li stimulas akre protesti kontraŭ la pres**mal**ibereco. La spiona servo jam de tempo lin kontroladas, tage kaj nokte, ĝis kiam la politika polico, je la 19ª de januaro 1942, arestas lin en la monaĥejo de Boxmeer. Konduk-ita unue al malliberejo en Scheveningen, li estas submetita al perforta pridemandado, daŭrinta tagojn. Fine oni *invitas* lin, skribe, klarigi la kialojn de tiel obstina opozicio far la nederlandanoj al submetiĝo al nacisocialismo. Prikonsentinte tion ĉi, Titus subskribas sian mortokondamnon: "Nederlandanoj, kaj protestantaj kaj katolikaj, havas maturan kredon kaj tion ĉi ili pruvis en multaj okazoj. Tial, se necese, ni oferos nian vivon al nia religio. La naziisma movado estas konsiderata ne nur ofendo al Dio pro sia perfortema agado, sed ankaŭ insulto al la gloraj tradicioj de la nederlanda nacio".

La 12an de marto 1942 li estas translokita al punlaborejo, en Amersfoort. Aŭtentika infero: batoj, humiligoj, priserĉadoj, draŝadoj, brutalaĵoj... Sed tute malzorgante pri tiaj suferadoj, kaŝe li kuraĝigas siajn samsortanojn, konfesprenas malsanulojn kaj mortontojn. Junie oni sendas lin al la koncentrejo Dachau, kie li pasigos en tiu *rezervujo de larmoj* sian lastan vivomonaton. Daŭre li klopodas helpi, almenaŭ per vortoj, siajn kunulojn: "Ne cedu al malamo - li rekomendas -, paciencu: je la fino de la tunelo vi trovos la Lumon".



La 26an de julio 1942, la SS-anoj decidas elimini lin, per injektado de karbola acido, mane de nederlanda flegistino.

La vivo kaj agado de Titus estu vojmontriloj por niaj vivoj, por niaj interhomaj rilatoj kaj por niaj streboj, por ke la mondo iĝu pli bona, pli paca kaj pli justa!

Sankta Titus Brandsma, preĝu por ni!

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

Titus Brandsma, la Esperantisto

Nune oni ne scias, kiam li eklernis Esperanton, sed en *Nederlanda Katoliko*, aŭguste 1911, en la listo de *Ĝeneralaj membroj*, aperas inter la novenskribiĝintoj lia nomo. Samtempe li aliĝis ankaŭ al IKUE: en ties ĉi jarlibroj de la jaroj 1926, 1928, 1931, 1932 kaj 1938 li estis inter la aliĝantoj. Ofte li kontribuis al ĝia organo *Espero Katolika*, per recenzoj kaj raportoj, dum diverstemajn artikolojn li verkis por *Nederlanda Katoliko*. Jam *en 1911, kiam Hago gastigis la 2an IKUE-kongreson (14-18 aŭgusto) li eniris dek-kapan Komisionon taskigitan verki Eklezian radikaron. En ĝi membris pioniroj de la katolika E-movado: mons-ro Giambene, p. Dombrovski, p. Bianchini, s-ro Colas k.a. (*ndr: informoj de Marija Belošević). En tiu revuo, 1913, legeblas en la rubriko *Kroniko de I.K.U.E.* pri lia partopreno

→

en la kvara jarkunveno de *Nederlanda Katoliko*, dum kiu "la Rev. Moŝto Pastro Titus Brandsma, profesoro de la Karmelita monaĥejo en Oss, oferis la S-tan Meson por la vivantaj kaj mortintaj Liganoj" en la preĝejeto de la Rev. Fratinoj de Mariënburg. Ĉeestis pli ol 200 fideluloj. La jarkunveno okazis dimanĉon la 20an de Aprilo 1913 en la antikva urbo "s'-Hertogenbosch", nomata simple "den Bosch".

Li estis komitatano por la unua nederlanda Esperanto-kongreso - 1934 - kaj inter la partoprenintoj de la 19a I KUE-Kongreso (1937, Hago).

Li gvidis la komisionon pri legado kaj studado de *Nederlanda Katoliko*.

Tio supre estas la sekvo de pluraj esploroj diversloke, interrete, kaj donas jam mirindan superrigardon al plurfaceta agado de tiu ĉi eksterordinare kuraĝa homo, religiulo, ĵurnalisto, pacifisto kaj Esperantisto. Certe oni daŭrigos larĝakampe la esploradon, ĉar konado de lia farado plibonigos ankaŭ nian spiritan vivon.

Ni estu fieraj pro tiu ĉi grandioza rekono!

Poezio tradukita esperanten

verkita nederlande de Titus Brandsma
en la izolita ĉelo n. 577
Scheveningen, 12-13 februaro 1942

ANTAŬ LA BILDO DE JESUO (1A VERSIO)

Jesuo, kiam mi rigardas Vin,
denove mi ekvivas de Vi mem.
Ĉar Via Koro daŭre amas min,
kvazaŭ per aparta amikem'.
Kuraĝon plian tio jam postulas,
aflikto devas esti mia ĝoj';
ĉi-maniere mi al Vi similas,
kondukas al la Regno kruta voj'.
Mi estas en sufero ja benita –
por mi senteblas ne plu la dolor',
sed sort', ho Dio, plene elektita
por unuigi min kun Via Kor'.
Ĉi tie tutsilenta, tutsoleca,
mi restu, kie vintra frost' tremigas;
forestu kompanio homfrateca -
ĉi tie izoliĝo ne lacigas.
Tial ke Vi, Jesuo, apudestas;
neniam pliproksimis amo Via.
Do restu kie mi, kaptito, restas,
Jesuo dolĉa, ĉefbonaĵo mia.

Tradukis: Roderic McDermott, Britio
Espero Katolika, 11/1982

(2A VERSIO)


Ho Jesuo, kiam mi rigardas Vin,
tiam revivas (la konscio), ke mi amas Vin;
kaj ke ankaŭ Via koro min amas,
kiel speciale karan amikon.
Kvankam tio postulas (de mi) pli da suferkuraĝo,
nu, ĉia suferado al mi estas bonvena,
ĉar tiamaniere mi similas al Vi,
kaj ĉar ĝi estas la vojo al Via Regno.

Mi estas feliĉa en mia aflikto,
ĉar mi scias ĝin ne plu aflikto,
sed plej eksterordinara privilegio,
kiu kunigas min kun Vi, ho Dio!

Aĥ, nur lasu min tute izolita tie ĉi en silento;
estu malvarme kaj froste ĉirkaŭ mi,
kaj ne allasu (konsolajn) homojn ĉe mi;
la solestado tie ĉi min ne lacigas.

Ja Vi, ho Jesuo, estas kun mi,
neniam (antaŭe) mi estis tiel proksima al Vi;
do restu, restu ĉe mi, Jesuo dolĉa,
Via ĉeesto igas ĉion bona!

tradukis: Manuel Halvelik, Belgio
Espero Katolika, 3-4/1986





Muziko kaj teksto de s-ro Albrecht KRONENBERGER, okaze de la tago de la sanktproklamo-**2022-05-15**

OMAĜE AL TITUS BRANDASMA, MEDALO KAJ POŜTMARKO

Por la 3ª de novembro 1985, tago de lia beatigo far Papo Johano Paŭlo la 2ª en Baziliko sankta Petro, estas stampita en Romo medalo liamemore. Sur la frontflanko aperas lia reliefa maldekstra profilo, ĉirkaŭata de jenaj skribaĵoj: + TITUS BRANDSMA + Beatificatio MCMLXXXV. Sur la dorsoflanko, videblas ŝildo kun ĉirkaŭaj sciigoj: ✶*Bolsward 1881-Dachau 1942*✶ Roma 3-11-1985





La medalo estas el bronzo, kun diametro de 62mm kaj pezo de 78 gramoj; la medalisto estas Emilio Senesi el Milano, specialisto pri religiaj objektoj.


Je la 23ª de aprilo 2002 en Nederlando, provincoj *Gelderland*, estas emisiita memoriga folieto el 12 poŝtmarkoj; en la centra kolumno aperas 6 diversaj bildoj: la unua estas tiu de Titus. Sub ĝi legeblas la jeno: **La beatigita rezistheroo mortis en Dachau.**



En 2005, Titus Brandsma estas elektita fare de la loĝantaro de Nijmegen la plej eminenta loĝanto en la historio de ilia urbo.

Konsiloj el intaj tempoj!


En 1931 la Librofako de Heroldo eldonis, por la posta jaro 1932ª mur– kaj tablo-kalendarojn, sur kiuj legeblas ĉi tiel oportuna parolo, valida ankoraŭ hodiaŭ!



Ne ploru,
Laboru!
Ne plendu,
Sed mendu!
Agu kaj pagu,
Ridu kaj fidu!
Ne vane hezitu,
Sed firme decidu!
For pesimismon —
Ne helpas ĝi homaron!
Ne vin pendigu,
Sed nian kalendaron!

Vi forgesos ĉiutage dum kelkaj momentoj la malbonan tempon, se vi posedos nian kalendaron por 1932, kiu estos dediĉita al la bonhumoro. Ni eldonos du specoin: murkalendaron (prezo gmk. 1.50) kaj tablokalendaron kun metala submetaĵo (prezo gmk. 3.20). Por sendkostoj kaj pakaĵo aldonu 10 %. Jam nun antaŭmendu la kalendaron ĉe la Librofako de Heroldo, Köln, Brüsseler Strasse 94, Germ.

Cerbotiklilo de Viglo



ENTRUDIĜINTA BILDGRUPO
Kiu el la kvar grupoj de geometriaj figuroj enŝteliĝis, laŭ logika kriterio? "Cerbumu, cerbumu, diras nia Viglo".

Solvo en la venonta TEA-Bulteno

Aforismoj

Tenu la okulojn larĝe malfermitaj antaŭ la geedziĝo; kaj duonfermitaj poste.

Benjamin Franklin (1706 - 1790)
usona sciencisto, beletristo kaj politikisto

Atentigo!

Bonan Somerumadon al vi ĉiuj!
Julie kaj Aŭguste
la TEA-sidejo estos fermita.
Ĝis la revido
vendredon la 9an de Septembro 2022!

Halt' al cigaredstumpoj!

Jam en 2018 aperis sur la Bulteno, enkadre de artikolo pri poluado mara-tera-aera, sciigoj pri la medimalpurigado per plej diversaj substancoj, precipe plastaj, sed ankaŭ pri tiuj etaj restaĵoj de cigaredoj, kiaj estas la cigaredstumpoj, nuntempe invadantaj ĉiajn ter- kaj marspacojn. Pasis de tiam 4 jaroj kaj malgraŭ la fakto ke statistikoj evidentigas, ke iom malpliiĝas la nombro de fumantoj, tamen, miaŝajne, pliiĝas konsiderinde tiu de la poluantoj.

Nur oni pensu, ke 40% de la forĵetitaĵoj en Mediteranean maron konsistas el cigaredstumpoj, kiuj estas venenaj kaj por la medio kaj por ĉiuj kreitaĵoj.

Komence de la pasinta jarcento la fumfiltriloj estis precipe el celulozo, dum hodiaŭ tiuj konsistas el substanco pli fortika kaj ne malkombinebla, nome el celuloza acetato, kio estas kunmetaĵo de celulozo kaj anhidrida acetato. Al tiu ĉi kunigo aldoniĝas etaj kvantoj da papero kaj solvantoj, kies tasko estas reteni parte la fumon, kaj partikloj produktataj de la brulo de tabako kaj papero. Pro ĝia ĥemia strukturo, la biomalkombinado de tiu *filtriloj* povus daŭri eĉ 15 jarojn. Imagu: 15 jarojn!!!



Ni observu iomete kelkajn statistikojn ekz. rilate al Italio:

75 miliardoj estas la fumitaj cigaredoj, kies unu triono estas ĵetita en rubejon, dum du trionoj ĉien ajn. En la tuta mondo estas forlasataj 4,5 triilionoj da cigaredstumpoj. Mi eĉ ne kapablas, havi ideon kiom da pezo povas havi tiujn 4,5 triilionojn! Tamen ni prikonsideru, ke ununura cigaredstumpo poluas ĝis mil litroj da akvo!

Oni konsciu, ke tabaka uzado ellasas en la medion pli ol 4 000 ĥemiajn substancojn, el kiuj multaj efikas irite, noce, tokse kaj kancerige. Sed fumanto ne nur malutilas al si mem, sed ankaŭ al aliaj kaj precipe al la medio. Per la stumpo kaj cindro de unu cigaredo, rezultoj de 5-minuta *ĝua fumado* diseliĝas en la aeron multnombraj ĥemiaĵoj: nikotino, benzeno (el-straktatan el karbo kaj nafto!), arseniko, amoniako, cianida acido, formaldehido, polonio-210 (ia radioaktiva elemento), celuloza acetato, plus plasta materialo de la filtrilo. Ĉu ĉio ĉi ja ne estas jam konvinka argumento por decidi ne plu fumadi aŭ tute ne ekfumi? Sed tie supre estas la nura listo de la danĝeraj substancoj, produktitaj de UNUNURA cigaredo, tial oni devas nun obligi la kvanton de la danĝeraj elementoj eligitaj en la aeron dum unu tuta jaro kaj produktitaj de 75 miliardoj da cigaredoj. Do la kunmetitaĵo de la nocaj elementoj konsistigos centojn da tunoj: nur de nikotino la itala medio ricevos **8 234 tunojn**!

Tamen, je ĉi punkto, ekaperas demando: se konsumitaj cigaredoj plus filtriloj produktas tiom da danĝeraj substancoj, kial oni ne konsideras iliajn finproduktaĵojn kiel toksemaj ruboj kaj kiel tiaj traktotaj?

Nuntempe (finfine!) oni direktas sian atenton ankaŭ al tiuj fumantoj, kiuj malpurigas stratojn, ĝardenojn, sablojn kaj plaĝojn, arbarojn kaj kampojn, maron kaj montojn, dissemante tien kaj ĉi tie siajn elfumitaĵojn, ne konsciantaj (ĉu pro malsaĝo, ĉu pro nekompreno, aŭ simpla indiferenteco*)* ke tiela agado kaŭzas grandiozan poluadon de la medio. Tre gravas haltigi kaj kontraŭstari, kiom eble plej frue, la dramajn konsekvencojn de la iom-post-ioma venenado de personoj kaj medio per la daŭraj kaj konstantaj eligadoj de la antaŭe indikitaj substancoj.

Oni devus koncentriĝi sur tri aspektoj de tiu problemo: klopodi per helpo de sociaj konsultejoj pliredukti la nombron de fumantoj kaj konsciigi la novajn generaciojn pri la seriozaj malbonaj efikoj de tabako-uzado. En produktada kaj komerca kampoj, oni devus, per taŭga leĝaro, malpermesi faradon kaj vendadon de cigaredoj, cigaroj kaj similaj artikloj enhavantaj filtrilojn nebiomalkombineblajn; devigi la produktantojn utiligi nur naturajn kaj biomalkombineblajn filtrilojn; kaj fine, sur la ujo, devas esti indikitaj la filtril-kombinaĵoj.

Se oni tiujn ekkonsideros toksaj elementoj, oni devas ankaŭ eltrovi la manieron por laŭnorme elimini tiajn danĝeraĵojn.

La vojo por atingi tiun celon certe estos nek facila nek simpla, tamen valoras la peno, por senigi la naturon kaj la homaron de tiu absolute forigenda danĝero minacanta nian tutan planedon.

Por fini, mi rakontas al vi bele instruan fabelon, reale okazintan (kaj eble ankoraŭ okazantan!), antaŭ kelkaj jaroj, sur iu sabla strando en Sicilio. Ĉiujare s-ro *Gianni* pasigas sian somerferian periodon en *Lido de Noto*, fama pro sia admirinda marbordo.

Iun tagon li iris al la plaĝo, kunportante verdan tablon, sur kiu li starigis plurajn vitrujojn kaj bone videblan afiŝeton kun jena skribo:

→

"Ni forigu de nia strando la cigaredstumpojn. Mi aĉetas tiujn po unu eŭra centimo. Tio ĉi ne estas ŝerco!" Ĉi invito altiris la atenton de plenpreskuloj kaj geinfanoj, tiom ke post malmulte da horoj ĉiuj vitrujoj estis plenigitaj. En la unua tago la pago al *plukantoj* egalis al 20



eŭroj. Estis knabo kiu sukcesis arigi eĉ 700 stumpojn, ricevante tiel 7 eŭrojn. Sed alia tre signifa afero dume estis okazinta, nome la gepatroj de pluraj knaboj partoprenintaj en tiu komuna agado ne permesis al la iniciatinto de tiu valora aktivado, elpoŝigi la meritatan kompenson, sed ili mem donis ĝin al siaj filoj.

Tio ĉi estas gratulinda farado, ĉar ĝi transdonis neforgeseblan mesaĝon pri civiliteco kaj bonkonduto al junularo sed ankaŭ al plenkreskularo. Vere imitinda ekzemplo!

Bonan someron al vi ĉiuj,
liberaj je cigaredstumpoj! *ELDo*

Fonto: NewSicilia 2016

Ankoraŭ kelkaj donitaĵoj:

*En la tabaka fumo enestas karbona dioksido, metano (hidrokarbono) kaj dioksido de azoto, kiuj poluas la internajn kaj eksterajn mediojn.

*Ĝi postlasas restaĵojn, kiuj deponiĝas sur surfacoj kaj estas ege malutilaj ĉefe por infanoj kaj hejmaj bestoj.

*La ellasado de tabakaj produktoj, laŭtakse, egalas al tri milionoj da transatlantikaj flugoj.

*La senarbarigado pro la tabakaj plantejoj, kiuj en la mondo okupas la spacon de ĉirkaŭ 200 000 hektaroj, kaŭzas pezajn konsekvencojn, kiaj estas la perdo de biodiverseco, grunda erozio, akva poluado, pliiĝo de karbondioksido (CO^2) en la atmosfero, ktp.

*Per fumado de 300 cigaredoj (dek kvin paketoj), oni foruzas unu arbon pro la sekiga procezo de la tabakaj folioj.

*La tabaka kultivado bezonas ĥemiaĵon, inkluzive de pesticidoj kaj nenaturaj fekundigiloj, kiuj siavice malpurigas la akvojn.

El ttt-ejo de la itala Ministerio pri Sano

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO!

Il 5 per mille dell'IRPEF
all'Associazione Esperantista Triestina ODV
Associazione di volontariato
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni di legge, possono destinare il **5 per mille delle imposte** a sostegno delle Associazioni di **VOLONTARIATO.**

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

È sufficiente indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella per il VOLONTARIATO nel momento in cui si effettua la dichiarazione dei redditi (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc).

Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invitiamo perciò amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi questo numero di Codice Fiscale.

GRAZIE!!!



Radiaj Alirprogramoj RAI Uno

6 julio	14h50 - Ĉu ni sukcesos fine partopreni en internacia renkontiĝo?
5 aŭgusto	14h50 - Italaj disertacioj pri la internacia lingvo Esperanto
7 septembro	14h50 - Kiu lingvo por la paco?

Aforismo

La virinoj devas demonstri esti kapablaj efike fari ĉion ajn du fojojn pli bone ol la viroj, por esti juĝitaj duonlertaj. Bonŝance ĉi tio tute ne malfacilas.

Charlotte Whitton (1896 - 1975)
Assistente sociale, politico, femminista.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO ODV
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org